

EKO 2013

Rekreita arĥivo de la ok postkongresaj komunikoj de la jaro, lanĉita sub la nomo 'Estraraj Komunikoj' kun la celo subteni la landan agadon kaj la novan AMO-programon.

Sendita el Budapeŝto la 29an de julio, sed verkita en Islando! Nur al Landaj Asocioj. Vortoj: 440

Karaj Landaj Asocioj de UEA (aliĝintaj aŭ ne)

Saluton el Islando! La kongreso sukcese venis al fino, la laboro ekas. Mi rapidas kontakti vin denove, ekde baldaŭ mi riskas ne havi retkonekton ĝis sabato, denove en Hungario. Mia celo estas koncize prezenti tri kampojn por nia kunlaboro.

Membro-varbado por 2014

Kiel vi scias, la membronombro en UEA faladas, kiu siavice limigas niajn enspezojn kaj niajn eblojn investi en monda evoluigo. Tial, la nova estraro donas prioritaton al membro-(re)varbado tra la periodo de oktobro 2013 ĝis marto 2014. Ni forte petas vin ludi aktivan rolon en tiu laboro. Ni jam surloke kreis tekston por nova varbilo, kiun vi ricevos kaj povos plie mendi. Baza tasko de via kotizperanto estas remembrigi ekzistantajn membrojn, sed necesas ankaŭ atingi ĝisnunajn nemembrojn ĉe vi, por konvinki ilin aldoniĝi al la monda familio. En tiu laboro estus dezirinde, ke la tuta estraro de la Landa Asocio formulu planojn kaj helpu al la kotizperanto realigi tiujn. Krome, ni pretigos afiŝojn kaj materialojn por la starigo de UEA-budoj en viaj kongresoj kaj aranĝoj; sekvos ankaŭ Gvidilo pri Membrovarbado – surbaze de tekstoj liveritaj el landoj, kie la varbado jam bone funkcias.

Aktivula trejnado

Ni serĉos kunlaboron kun iuj Landaj Asocioj pri organizado de trejnsesioj aŭ seminarioj tra la sekva periodo, kun la unua imageble frue en 2014. Tion ni celas en almenaŭ du kontinentoj, kun latinamerika seminario iel ligita al la UK en Bonaero aŭ la ILEI-konferenco en Montevideo. Necesas ellabori organizan kaj finanĉan dividon inter la centra UEA kaj la Landa Asocio, sed esence UEA liveros la enhavon (tre eble kun enplekto de enlandaj kapabluloj) kaj la Landa Asocio la logistikon. Se via lando interesiĝos pri tio, bonvolu kontakti nin!

Superrigardo de nuna stato

Ekde nun ni komencos arigi landajn dosierojn, kiuj kunigu ĉiun eblan utilan informon pri viaj landoj. Poste, vi ricevos la kompilon por via lando cele al via kontrolo kaj kompletigo. Kadre de tio, ni ĉe la jarfino petos al vi koncize resumi la atingojn kaj eventojn el 2013 kaj viajn planojn por 2014. Celo de la superrigardo estas krei resumon pri ĉiuj fakaj asocioj, kiuj agas en la via lando, ĉu formale, ĉu per unuopuloj. Enprenindas informoj pri E-Centroj, bibliotekoj kaj lokaj grupoj – la informoj pri tiuj grandparte ekzistas, sed diversloke. Proksimuma modelo pri tiuj raportoj videblas ĉe la retejo de ILEI ĉe www.ilei.info, sub 'Instancoj > Landaj Sekcioj'. En ILEI ni kompilis jarajn raportojn de la sekcioj por 2009, 2010 kaj 2011.

Evidente, ekzistas pliaj planoj por intensigo de nia kunlaboro. Pri ili alian fojon. Bonvenas viaj proponoj pri utilaj projektoj starigindaj kunlabore kun la internacia UEA.



Nova servo de Universala Esperanto-Asocio kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, lanĉita en julio 2013, kaj seninterrompe liverita de post tiam, per 264 komunikoj.

